

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTO ★

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj. Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

### Protaktantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gilli Noria, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank- kaj fabrikk-  
direktoro, Kaunas.

**N-o 148a**  
1. 8. 1923

### Redakcio:

Ĉefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.

Redakciaj kunlaborantoj:  
Zanon! (literaturo)  
M. Butin, L. K.

### Administracio:

(Preciza poŝtadreso)  
Esperanto Triumfonta  
Horrem bei Köln, Germanlando.

### Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimena kaj unua numero de nova abono.

**Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa**

## Ĉu universalaj kongresoj?

De D-ro Orthal, Nürnberg.

Ne malofte aŭdiĝas en la Esperantistaro duboj, ĉu estas konservinda nia tradicio, aranjaj periodoj, se eble ĉiujarajn tutesperantistajn kunvenojn, nomatajn mondkongresoj. La argumentado de ĉi tiuj kongreskontraŭuloj estas sufiĉe seriozaj, por meriti konsciencan kaj senpartian ekzamenon.

Ili diras 1-e, ke la unuaj mondkongresoj celadis unuflanke pruvi al la kongresanoj mem kaj al la neesperantistoj la uzeblecon de Esperanto por ĉi tiu interkompreniĝo de diverslingvanoj. La provo sukcesis, superflua do ĉiujara ripetado. 2-e, la grandaj laborkunsidoj ne taŭgas por la propagandaj kaj taktikaj problemoj solvotaj; la rezulto de la ĝisnunaj kongresdecidoj pravigas tiurilatan skeptikecon. 3-e, ĉiu kongreso absorbas enormajn energiojn kaj monrimedojn por propagando; ĉiu kongresano ofertas multe da tempo kaj mono, kiuj perdisas por la verda kaj organiza laboro.

Kiel ĉiu afero montras du flankojn, tiel ĉiu el tiuj vidpunktoj enhavas iom da vero. Certe la unuaj kongresoj, precipe tiu de Boulogne, havis apartan signifon; per ĝi Esperanto kvazaŭ subiris sukcesege la decidan ekzamenon pri praktikaj taŭgeco kaj valoro. De tiu tempo Esperanto plenaryte pretendas la rangon de vivanta, moderna lingvo. Tamen ne estas superflue, ĉiam denove en tre frapanta maniero ripetadi la pruvon. La Esperantistaro ne estas konstanta, el ŝi mem kreskanta popolo; seninterrompe ĝi ŝanĝas laŭ nombro kaj laŭ personoj. Jamaj samcelantoj perdisas per morto, per senkuragiĝo, per indiferenteco; novaj kunbatalantoj plenas kaj pligrandigas la vicojn. Kaj al tiuj ĉi novuloj necesas la profunda konvinko, kiun nur povas havigi la sperto de internacia kongreso. Ni ne forgesu, ke ĝis la finvenko de nia ideo la interrilatoj kun eksterlandaj Esperantistoj por la plej multaj samideanoj nur ebligas skribi; precipe en malgrandaj urboj malofte alvenas Esperantistoj, kiuj konas kaj vizitas la tieajn samideanojn. Niaj kursanoj do ĝenerale nur havas okazon ekzerci la internacian lingvon per interparoladoj kun samlandanoj. Tia ekzercado havas la karakteron de lernadaj, de bonintencata teatroludado; mankas la praktika bezono, la sento de neevitebleco, kiu sola pravigas kaj ĉarmigas la uzon de fremdlingvo. La internacia kongreso nun intermiksas la diverslingvanojn, la unuan fojon niaj novuloj „travivas“ Esperanton, ili interparolas kun homfratoj, kies buŝo al ili estus muta, al kies vortoj ilia orelo estus surda, se ne ekzistus la helpa lingvo! Jen fortega, neniam forgesebla impresio! Tiel forta, ke multaj, kiuj en sia hejmlando nur timeme balbutis Esperanton, en daŭro de kelkaj tagoj fariĝas perfektaj, elokventaj Esperantistoj. La ĝojo, entuziasmo streĉas la energiojn kaj incitas ĉiujn fortojn de koro kaj cerbo. Kaj ĉi tiu majesta flamo ne estingiĝas kun la kongresino; la kongresintoj kunportas sanktajn fajrerojn en la patrujojn kaj ekbruligas per ili la entuziasmon de la samlandanoj, al kiuj ili rakontas pri la brilo de l' kongreso, pri la vivo de la interhoma lingvo! Kaj ili alvokas al la hejmerestintoj: Ni ne estas solecaj, ne nur ni laboras, klopodas, suferetas por la alta celo — ĉie sur la terglobo ekzistas noblaj animoj, kiuj kun samaj fervoro kaj esperemo laboras, klopodas, suferetas! Amikoj, ĉu tio estas nenio? Ĉu ne tia plifortigo de kongresanoj kaj de nekongresanoj sole pravigas la universalajn kongresojn?

El la neesperantistoj certe miloj aŭdis pri la sukcesoj de niaj unuaj kongresoj, sed centmiloj ne legis la tiamajn gazetraportojn aŭ forgesis ilin. Ni pripensu, ke la mondlingva demando nur estas unu el multaj kulturproblemoj, okupantaj la nuntempon. Kio por ni Esperantistoj estas gravega afero, unu el niaj vivceloj kaj plej al'aj esperoj, por granda parto de la indiferenta tutmondo estas nekonitaĵo aŭ utopio aŭ eĉ ridindaĵo. Kion ili aŭdas aŭ legas pri Esperanto, ili perceptas kun duona atento, kun nekredema mieno, kun dormanta animo.

Nur per vivegaj impresoj, per trudema manifestacio oni povas allogi ilian intereson, forigi ilian dubon,

## Koran, koreĝan bonvenon!

Fine alvenis la tagoj de la kongreso, kiujn ni atendis kun ĝojo kaj sopiro, sed ankaŭ kun iom da zorgo kaj timo. Ju pli malgrandiĝis la tempospaco ĝis la komenco de l' kongreso, des pli ja amasiĝis la laboroj, la malfacilaĵoj nepre superotaj....

Sed ne parolu ni pri nia kaj nia tasko en momento, en kiu nia koro tute apartenas al vi, karaj kongresanoj! Multaj el vi faris grandajn oferojn por ebligi la vojaĝon al Nürnberg. Multaj sparis de post monatoj por kolekti la necesajn monrimedojn, multaj rezignis je ĉia libertempa plezuro kaj mallacigo, multaj forlasis familion, amikojn, hejmlandon, logataj kaj pelataj de unu penso: ĉeesti la Dekkvinan!

Ni scias, ke vin allogis kaj altiris nek la vidindaĵoj mondĉamaj de la kongresurbo, nek la promesitaj de la kongresprogramo festaraĝoj, kondukis vin ĉefe la amo al nia komuna celo, la dezirego servi al la granda ideo de tutmonda interkompreniĝo.

Kaj ni, al kiuj la Esperantistaro konfidis la preparojn de tiu eksterordinare grava festo, ni akceptas vin ne nur kiel gastojn, sed kiel amikojn, kiuj kunigas kun ni por kompletigi la rondon familian. Amikojn kaj amikon oni ne bonvenigas per grandaj paroloj, oni premas ilian manon kaj petas ilin sidigi. Tiel al vi, ĉiulandaj geamikoj, ni renkonte etendas niajn brakojn, salutante premas la manon kaj sincere alvokas al vi:

## Koran, koreĝan bonvenon en Nürnberg!

Loka Kongresa Komitato.

ekveki ilian spiriton. Se ili aŭdas, ke miloj da Esperantistoj el ĉiuj anguloj de la mondo kunvenis, ke la partoprenintoj de kelkdek diverslingvaj landoj senpene interparolis kaj interkomprenis, ke multaj registaroj kaj gravaj internaciaj asocioj oficiale reprezentis, tiam ankaŭ la plejindiferentuloj kaj skeptikuloj ŝanceliĝas. Certe ne ĉiuj tuj fariĝos Esperantistoj, tamen multaj de nun pli serioze kaj juste juĝos pri niaj celoj. Laŭsperte ĉiam en la kongreslando mem la gazetaro kaj la publiko precipan intereson dediĉas al la kongrespreparoj kaj al la kongreso mem; dank' al la ĉiujara alternado de la kongreslando iom post iom la tuta tergloba ĝuas la benon de ĉi tiu nesuperbla propagando.

La dua argumento de la kongreskontraŭuloj, ke la ĝisnunaj rezultoj de niaj mondkongresaj pritraktadoj ne estas proporciaj al la enorma aparato, laŭ mia opinio estas ĝusta, sed nenion pravas kontraŭ la kongreso. Nur naiva teoriulo povas supozi, ke iu ajn kunvenantaro de homoj, eĉ se ĝi konsistas el gigantoj de spirito kaj volo, per priksiladoj, rezolucioj, decidoj povas venkiĝi moralan, socialan, kulturan ideon. La kredo, tre disvastigita en la popolo, ankaŭ inter la Esperantistaro, ke liĝoj, asocioj, kongresoj povas kaj devas solvi la taskon solvotan de ni, estas fatala eraro, kiun kontraŭbatali mi volonte uzas la ĉi nunan okazon.

„Men not measures“, ĉi tiu angla sentenco valoras analoge pri la realigo de ideoj, ni nur traduku ĝin per: „Geviroj, ne organizacioj“. La

streĉita volo, la energio, la prudenta, diligente persista, metoda agado de unu propagandisto pli potence antaŭenpuŝas nian aferon ol la plej bone organizita milmembra ligo! Mi konas la kontraŭargumentojn; mi scias, kiom estas necese, kunigi la fortojn, krei demokratajn organizojn por potence reprezenti nian movadon eksteren, mi ne subtakas la moralan apogon, kiun donas multmembraj grupoj, liĝoj, asocioj al nia laboro, sed mi rifuzas troaksi ilian efikeblecon kaj per tio kaŭzi seniluziigojn kaj ekdormigi la senton de individua respondeco.

La kongreso ne povas konkuri per siaj traktadoj kaj decidoj la mondon por nia ideo. Ĝi eĉ ne povas krei tute novajn projektojn kaj organizojn, kiuj senpere aldeigas videblajn, brilajn rezultojn. Tute ne! Niaj sukcesoj dependas de milobla laŭformika laboro, kiun nur malsaĝulo postulas de kongreso. Niaj kongreskunsidoj estas taŭgaj por aŭdigi la konvinkojn de elokventaj kompetentuloj al la Esperanta publiko, por plifaciligi la interŝanĝon de opinioj inter niaj gvidantoj, por doni novajn sugestojn kaj instigojn al ĉiuj kongresanoj. Jen la celoj kaj la limoj de ĉiu kongresa laboro! Rigardite de ĉi tiu vidpunkto niaj kongresoj estis bonaj, estas utilaj, estos necesaj. Mi legis en raporto pri la antaŭnelonga kongreso de la paciŝtoj, ke estas sensencaĵo sonigi el la monstra alteco de trideklanda turo delikatan „ĉambran muzikon“, konvenas krudrimaj, gigantaj trombonoj — tute la samo valoras pri niaj kongresoj. La tieaj paroladoj devas impresi la grandan publikon, ili do ne povas pritrakti la malfacilaĵojn, sekajn specialaĵojn de nia propaganda laboro, de nia taktika metodo, de niaj intertraktadoj kun la ĉiulandaj registaroj kaj eminentuloj ktp.

Tiom pri la ĝeneralaj laborkunsidoj. En la fak-kunvenoj, kie teknikaj detaloj estas pritraktotaj, ankaŭ tre praktika laboro estas farebla, kondiĉe ke oni bone preparu ilin, klare substancigu la pozitivan taskon de ĉiu kunsido. Se ni tamen nur kunvenigas aron da samfakuloj sen certa programo kaj gvidado, la rezulto estos nature senfruktaj babilado kaj tempo-perdo.

Se ni do kun deca modestece kaj scienca seniluzio ekzamenas „a priori“ la eblecon, akceli per universala kongreso nian movadon, flankenŝovis la antaŭjuĝojn kaj erarojn, konstatis la verajn devojn kaj efikojn, — restas sufiĉe kaj sufiĉege da tempo por pravigi periodajn mondkongresojn. Kaj kiu kredas necesaj la kongresojn, devas ankaŭ aprobi la laborojn kaj elspezojn, kiujn kaŭzas la preparado kaj organizado. Mi mem, ano de la L. K. K. por la XV-a, konfesas ĝemante: Tia kongreso altiras teruran amason da zorgo, laborejoj, neagrabloj, ĉagrenoj kaj aliaj diabloj por ĉiuj organizantoj. Sed riĉege ili estas rekompencataj per la konscio, per sia klopodo servi kaj eble iomete utili al nia homama ideo. Kaj la opa Esperantisto, kiu pagas la kongreskotizon, kiu sparas por la kongresvojaĝo, okupas parton de sia libertempo per la kongresvizito — ĉu li ne havas kompenso la ŝancon de multaj kaj profundaj raciaj kaj neraciaj plezuroj? Ĉu al li ne ridas la espero, kuneŝti semajnon kun miloj da „samideanoj“ — ni atentu foje la laŭvortan sencan de ĉi tiu iom trouzita kunmetajo?! — Ĉu tio ne instigos lin, fervorege studadi nian lingvon, pli diligente varbi novajn anojn, ekligi jam antaŭ la kongreso internaciajn rilatojn? Ĉu li do povas pli profite uzi tempon kaj monon, ol vizitante la kongreson? Kiu scias certe, ke la mono kaj tempo ŝparataj per nevizito de la kongreso estos oferataj por Esperanto aŭ entute por morala ideo?

Tial amikoj, ne tuŝu la kongresojn! Certigu tute kontraŭe laŭ viaj partoj kaj povo la plensukceson, aligante, partoprenante, kunlaborante. Tion ĉiu el vi ŝuldas al viaj kunbatalantoj, al nia noblega idealo, al la honorinda tradicio, inaŭgurita kaj sankciita de nia majstro mem.

**Aĉetu la kongresnumerojn de E. T.**

3 Propozoj al la kongreso.

Por diskuto en la kunsidoj la 3 sekvantaj proponoj estas submetitaj al la kongreso:

Ia Propozo:

La XVa Kongreso petu la nacian societon, unuigintajn en K. R., ke ili zorgu pri oficiala statistiko de nia movado — ĉiu en sia lando — sur la bazo de komuna demando, kaj ke ili komencu tiun laboron, kolektante la statistikan materialon por la jaro 1922/23.

Rimarko: La statistiko de UEA, kiu estas unuigo de individuaj Esperantistoj internacie grupigitaj, estas tre valora; sed ĝi tute ne sufiĉas por domkompletan statistikon de nia movado. — La helpo de la naciaj societoj estas nepre necesa. — Komence sufiĉas tre simpla statistiko:

1) Ĝenerala, kiu raportu a) pri la urboj, kie ekzistas grupoj, b) pri la nombro de la grupoj, c) pri la nombroj de la grupanoj.

2) speciale A) rilate: „Esperanto kaj lernejoj“. a) urboj kaj lokoj en kiuj oni enkondukis Esperanton en lernejoj. b) nombroj kaj specoj de la lernejoj. c) nombroj de la lernantoj.

B) rilate: „Esperanto kaj komerc“. a) firmoj, kiuj korespondas Esperanton. b) firmoj kiuj uzas Esperanton por reklamo.

La Ĝenerala kaj speciala statistikoj devas esti bazataj sur raportoj de unuopaj grupoj. Tiaj statistikoj estas nepre necesaj por la celoj de nia propagando kaj pro la registaro. La materialo devas esti tute konfidinda kaj kiel eble plej komplete. Ĝis nun oni kutime nur „taksis“ sed ne povis precize „kalkuli“. Statistikoj laŭ taksado ne estas „statistikoj“.

En la landoj kie ekzistas pli ol unu societo, ĉiu societo liveru la materialon por sia anaro, kaj neirita institucio kunmetu la rezultojn. Estas necese, ke oni klopodu, ricevi ankaŭ la materialon de la neorganizitaj, izolaj grupoj ktp.

IIa Propozo:

La XVa Kongreso esprimu la deziron, ke la naciaj societoj zorgu por komplete listo de ĉiuj Esperanto-verkoj, eldonitaj en sia lando deponit 1887, aŭ minimume deponit la jaro 1911, en kiu aperis la katalogo de Davidov, por ke oni kiel eble plej baldaŭ povu eldoni kompletan internacian katalogon de nia literaturo.

Rimarko: Ĉi tiu laboro gravega kaj necesa se estos tro granda, se ĉiuj naciaj societoj prenos sur sin la taskon kolekti sian nacian materialon, uzante la Esperanto-gazetojn, la katalogojn de la Esperanto-eldonejoj ktp. de sia lando, kiuj ja raportis pri ĉiuj novaĵoj, kaj ĉis 1911 kontrolante kaj kompletante la katalogon de Davidov.

IIIa Propozo:

La XVa Kongreso esprimu la deziron, ke dum venontaj kongresoj estu metataj en la oficialan tabordon de la komunaj kongreslaborkunsidoj paroladoj de lertaj kaj spertaj samideanoj pri temoj sufiĉe interesaj kaj gravaj por la tutmonda Esperantistaro kaj liverantaj materialon por komuna diskuto.

Rimarko: Dum niaj lastaj kongresoj ni preskaŭ nur aŭdis la raportojn de niaj oficialaj institucioj kaj preparis preskaŭ nur temojn de organizado. Por la XVa la programo enhavas por la oficialaj laborkunsidoj de la tuta kongresano nur la raportojn de niaj institucioj. Tio tute ne sufiĉas. Ni bezonas „kulminaciajn punktojn“ ne nur dum la malferma kunsido, sed ankaŭ dum lalaborkunsidoj. Ekzistas multaj temoj interesegaj por ĉiuj, gravegaj por nia tuta movado, kiuj povas kaj devas esti pritraktataj oficiale kaj internacie dum la kongreso.

Tiaj paroladoj devas esti bazataj sur diligenta preparo kaj kiel eble plej scienca laboro. Ili allogos ne nur la kongresanojn dum la kongreso, ili ankaŭ allogos al la kongreso ĉi tiujn samideanojn, kiuj ne venos pro nura amuzado kaj preferas seriozan laboron. Krom tio ili per si mem montrons al la mondo la taŭgecon kaj superecon de nia lingvo.

Komencu jam faras la komercistoj, kunvenantaj en Nürnberg, aranĝante praktikan demonstracion komencu per ekonomiaj paroladoj.

Oni parolu Esperanton.

Unuavide ŝajnas superflue kaj eĉ paradokse, alvoki al la partoprenantoj de Esperanto-kongreso: Parolu dum la kongreso Esperanton! Kiu neniam ceestis mondkongreson aŭ partoprenante ne observis la Esperantan popolon, ne komprenos tian admonon; por ĉi estas kompreneble, ke Esperantistoj dum Esperanto-kongresoj nur parolas Esperante. Dum nia XIII-a en Praha mi faris aliajn spertojn. Mi ne

Programo de la XVa Universala Kongreso de Esperanto Nürnberg.

Table with columns for Tagoj (Days) 8-22 and rows for Merkreto, Jaŭdo, Vendredo, Sabato, Dimanĉo, Lundo, Mardo, Merkreto. Includes sections like NACIAJ KUNVENOJ, Mallerma Kunsido, I9 Laborkunsido, and various cultural events.

Table with columns for Tagoj (Days) 8-22 and rows for Merkreto, Jaŭdo, Vendredo, Sabato, Dimanĉo, Lundo, Mardo, Merkreto. Includes sections like TUTTAGA EKSKURSO AL ROTHENBURG, IIA Labor-kunsido, and IIIa Laborkunsido.

La nombroj indikitaj en la tabelo montras la numerojn de la ĉambroj. Rimarkigo: La ĉambroj 01-25 troviĝas en la fakunsidoj kontraŭ la kongresejo, signita per „Fak“ en la urbplano. La ĉambroj 30-40 estas en la kongresejo.

aludas pri tio, ke partoprenis karavano de svedoj, tute ne scianta Esperanton; pri tio ja disputis kaj juĝis la publika kritiko. Sed ofte kaj oftege mi sidigis ĉe tablo de kongresanoj, kie oni ne aŭdis unu Esperantan vorton; pli malpli kontraŭvole oni respondis en Esperanto miajn Esperantajn demandojn. Nekredeble, sed vere!

La kaŭzoj por tia absurdaĵo estas evidente jenaj: Kongresojn vizitas multaj neperfektaj Esperantistoj. Por ili estas penige, paroli kaj kompreni la fremdlingvon. Plue ili timas, enigi la kun ili parolantajn personojn per sia balbutado kaj malkaŝi sian lingvan mallertecon. Tial ili preferas la interrilaton kun samlingvanoj kaj konsolas sin per la argumento, ke ankaŭ tiuj ĉi same pekas, ke morgaŭ ili pli fervore parolos Esperante k. t. p.

Tian fatalan „tradicion“ ni tutenergie devas kontraŭbatali kaj ekstermi. Unu el la ĉefaj taskoj de niaj kongresoj ja estas, ke la partoprenantoj perfektigu siajn lingvajn konojn, korektu kaj internaciigu la prononcadon kaj per tio pligrandigu la popolon de efektivaj Esperantistoj. Tio nur estas atingebla, se ĉiu opa persono diligentege uzas la kongresan semajnon, profitas ĉiun okazon, interparoli kun eksterlandanoj kaj superas la aluditajn internajn barojn. Certe laĝiga streĉado de la spirita fortoj estas necesa por kaj babilu kelkajn horojn en lingvo ne sufiĉe sciata; precipe se ankaŭ la alia interparolanto malmulte majstras la lingvon. Sed ĉi tiu

ofero nepre estas postulota en la intereso de ĉiu persono kaj de la tuto. La komencanto baldaŭ spertos, ke jam kelktaga ekzerco ebligas fluan paroladon kaj komprenadon. Al li mi precipe konsilas, viziti ĉiujn ĝeneralajn kunsidojn, eĉ se la prikon-silitaj temoj ne ĉiam interesas lin. Precipe per la aŭskultado de bonaj parolantoj lia orelo akutimigos al la Esperantaj sonoj, lia elparolo plibonigos, li aŭdos vivan, belstilan esprimmanieron kaj alproprigos ĝin.

— Finota. —

Aĉetu la legendan "Litova Almanako" 3 1/2 sviz.-frk. Havebla en la kongresa liberejo aŭ ĉe la Litova Esperanto Asocio J. Maĉernis, Ukmerges pl. 45, Kaunas - Litovio.

IIa serĉas kunlaborantojn en la tuta mondo. Korespondon en germana aŭ Esperanta lingvoj. Spar- u. Credit-Aktiengesellschaft Geschäftsstelle Berlin S. W. 47.

Foiro de Reichenberg

Ĉeĥoslovakio okazos tuj post la kongreso de la 11.-19. aŭgusto 1923. Rapida kaj agrabla vojaĝo de Nürnberg-Dresden-Zittau al Reichenberg aŭ de Nürnberg-Eger-Karlsbad al Reichenberg. Foiraj legitimacioj haveblaj ĉe SCHENKER & Co., Sandstrasse 24, per kiu la foirvizitantoj ricevos 75%o rabaton al la vizitakso, eĉ bonvalutaj landoj 25%o. Esperantistoj akceptos kaj gvidos la kongresanojn.